

Solutions for chapter 3

- 3.1** 1 Is Maria the daughter of Mr. and Mrs. Lang? 2 Is Andreo the daughter of Mr. and Mrs. Lang? 3 Is Mrs. Lang the father? 4 Is Maria a girl? 5 Is Andreo a dog? 6 Does the family eat in the kitchen? 7 Do Mr. and Mrs. Lang sleep in the bedroom? 8 Does the dog sleep in the bedroom? 9 Does Mr. Lang read in the bathroom? 10 Do the children play in the children's room?
- 3.2** 1 Ĉu sinjoro Lang estas la patro? 2 Kiu estas la patrino? 3 Ĉu Maria estas knabino? 4 Ĉu li estas la filo de gesinjoroj Lang? 5 Ĉu la familio manĝas en la manĝoĉambro? 6 Sinjoro Lang ne estas la patrino. 7 Andreo ne dormas en la hundejo. 8 La geknaboj ne dormas en la dormoĉambro, ili dormas en la infanejo. 9 Ĉu la hundo estas en la aŭtejo? 10 Ne, ĝi ne estas en la aŭtejo, ĝi estas en la hundejo. 11 La gefratoj lernas en la lernejo. 12 Ili ludas en la infanejo kaj ekster la domo.
- 3.3** 1 Jes, Maria estas la filino de gesinjoroj Lang. 2 Ne, Andreo ne estas la filino de gesinjoroj Lang, li estas la filo. 3 Ne, sinjorino Lang ne estas la patro, ŝi estas la patrino. 4 Jes, Maria estas knabino. 5 Ne, Andreo ne estas hundo, li estas knabo. 6 Ne, la familio ne manĝas en la kuirejo, ili manĝas en la manĝoĉambro. 7 Jes, gesinjoroj Lang dormas en la dormoĉambro. 8 Ne, la hundo ne dormas en la dormoĉambro, ĝi dormas en la hundejo. 9 Ne, sinjoro Lang ne legas en la banĉambro, li legas en la salono. 10 Jes, la infanoj ludas en la infanejo.
- 3.4** 1 Here's the house. Here's the room. 2 The room is modern and comfortable. 3 Is the room modern and comfortable? 4 Is the furniture new? 5 Mr. Lang and Maria are sitting in the room. 6 Are they working? 7 Who is sitting in a comfortable chair? Who is reading? 8 Who is sitting at the table? 9 Are two toys (standing) in front of her? 10 Are the toys new or old? 11 Are they clean or dirty? 12 Is Maria content (or: satisfied)? 13 Are you content? 14 Are the cupboards in front of Maria or behind her? 15 Are they big or small? 16 Which cupboard is big? 17 Which cupboard is small? 18 Is the cupboard wide or narrow? 19 Is the garden beautiful or ugly?
- 3.5** 1 Kiu estas la domo? 2 Kiu estas la ĉambro? 3 Ĉu la ĉambro estas moderna? 4 Ĉu ĝi estas komforta? 5 Ĉu la mebloj estas novaj aŭ malnovaj? 6 Ĉu la seĝo estas komforta? 7 Kiu sidas en la seĝo? 8 Kiu laboras? 9 Kiu legas? 10 Kiu sidas ĉe la tablo? 11 Ĉu ŝi estas kontenta? 12 Ĉu vi estas kontenta? 13 Unu ludilo estas nova, kaj unu estas malnova. 14 Unu ludilo estas pura, kaj unu estas malpura. 15 Kiu ludilo estas pura? 16 Ĉu la ĝardeno estas bela? 17 Ĉu ĝi estas granda aŭ malgranda? 18 Ĉu ĝi estas larĝa aŭ mallarĝa? 19 Malantaŭ Maria staras du ŝrankoj. 20 Unu ŝranko estas granda, kaj la alia estas malgranda. 21 Unu ŝranko estas larĝa, kaj la alia estas mallarĝa.
- 3.6** 1 Sinjoro Lang sidas antaŭ la kameno (or: antaŭ la fajro). 2 Maria sidas ĉe la tablo. 3 Antaŭ ŝi sur la tablo estas aŭto kaj pupo (or: ludiloj). 4 En la kameno estas fajro. 5 Ne, sinjoro Lang ne sidas sur la tablo, li sidas en brakseĝo. 6 Jes, la granda ŝranko estas por libroj. 7 Jes, ĝi estas larĝa. 8 Ne, ĝi ne pendas sur la muro, ĝi staras sur la planko. 9 La ŝranko por libroj estas granda kaj larĝa. 10 Sur la muro pendas malgranda kaj mallarĝa ŝranko. 11 Ĝi estas por la ludiloj de Maria. 12 Ne, la ĝardeno ne estas antaŭ la kameno, ĝi estas ekster la domo. 13 Ne, la ludiloj ne estas sur la planko, ili estas (or: staras) sur la tablo. 14 Jes kaj ne. La aŭto estas nova, sed la pupo estas malnova. 15 La brakseĝo estas komforta. 16 Jes, la libroŝranko estas granda. 17 La elektra lumo pendas super Maria.

Demandoj

1. Jes, la seĝo de sinjorino Brown estas tre komforta.
2. Jes, la kafo estas tre bona.
3. Ne, la infanoj ne estas en la ĝardeno, ili estas en la lernejo.
4. Maria estas kontenta pri tio.
5. La tago estas bela.
6. Gesinjoroj Lang laboras en la ĝardeno.
7. Jes, ili estas tre kontentaj pri ĝi.
8. Ne, ŝi ne estas kontenta.
9. Ne, li ne laboras en la ĝardeno.
10. Li sidas kaj legas dum sinjorino Brown laboras en la ĝardeno.